


La Krokodil'



Informbulteno de Esperanto-Kultur-Centro de Tuluzo
1 rue Jean Aillet, 31000 Toulouse
tel/fax 05 61 25 55 77 courriel : esperanto.toulouse@free.fr
<http://esperanto.toulouse.free.fr/>

N° 35 - oktobro/novembro 2005

Enhavo

Kalendaro	1
OKAZIS	
Inernacia Semajno en Calella	2
Semajnfina kurso en Arrout	3
Bâton à palabres	3
OKAZOS	
Zamenhof-festo	3
Pasigi la novjaron en Esperantio	3
F. Grin Prelegos en Florenco –UK	4
Mesaĝo de la Prezidanto de UEA	5
KULTURO	
Bibliotekisto konsilas	5
Internaciaj ekzamenoj de ILEI/UEA	7
Assemblée générale EKC	8

Kalendaro / Calendrier

Novembro

Ven 4 Manĝo-klaĉo (Maison Quartier Rangueil) je la 20-a horo

Mar 8 Début Cours Express (CIDES/Artisans du monde) 1 rue Joutx Aigues

Dim 13 A-G de EDE-Sud-Ouest à Narbonne

Ven 18 Stand au Centre de Conf Pierre Baudis (Soirée internationale du Réseau Inter-universitaire Midi-pyrénées) à partir de 19 h.30

Ven 18 AG des Cheminots espérantistes toulousains

Ĵaŭ 24 Debato en "Bâton à palabres" (temo: Kial la mondo estas perforta?)

Ven 25 A.-G. d'EKC (20.h, ĉe CIDES, 1 rue Joutx Aigues))

Decembro

Ven 2 Manĝo-klaĉo (Maison Quartier Rangueil) je la 20-a.

Sam 10 A.G. de l'asso Espéranto-Midi-Pyrénées. Maison Quartier Arènes Romaines

Sam 10 Zamenhof-festo Maison Quartier Arènes Romaines.

Ĵaŭ 15 Debato en 'Bâton à Palabres'.

... kaj la novjaraj renkontiĝoj:

2005-12-27/2006-01-02 Ago-semajno en Zakopane (PL)

<http://www.aso.pej.pl/>

2005-12-27/2006-01-03. I.S. en Xanten (DE)

<http://www.esperanto.de/is/eo/2005/>

2005-12-28 - 2006-01-08, Novjara Renkontiĝo en

Frankfurt/Main, (DE) <http://www.esperantoland.org/nr>

OKAZIS

13-a INTERNACIA ESPERANTO SEMAJNO DE LA KULTURO KAJ TURISMO CALELLA , KATALUNIO (HISPANIO) 1/8 DE OKTOBRO 2005

En la Internacia Semajno partoprenis sep tuluzanoj. Kiel unu el ili, mi povas aldoni al la oficiala raporto, ke la pejzaĝoj estas belegaj, la vetero estis milda kaj foje suna, tiel ke mi multe ĝuis promenadojn en la marborda urbeto, sur la ĉirkaŭaj montetoj. Aliaj sin banis en la maro ĉiutage.

Jeannette



Raporto de Luis SERRANO PEREZ, organizanto:

La dektria Esperanto-Semajno de la Kulturo kaj Turismo, superis sian propan rekordon. Aliĝis 110 gesamideanoj, el kiuj 62 estis eksterlandanoj, precipe francoj, el 10 naciecoj.

Dum la interkona vespero la etoso estis mirinda.. La novuloj, mirige rigardis la abundon da ĉampano "Esperanto", (marko registrita) bongustan muskaton, kies trinkadon oni realigis per tipaj hispanaj trinkiloj kaj la aldono de frandaĵoj..

Dum la Semajno funkciis ampleksa libro-servo, kaj okazis kvar prelegoj. Unu el ili estis farita de nia gastparolanto s-ano Stano Marĉek, ĉefa redaktoro de la UEA-organo "Esperanto", sub la titolo, **Cent jaroj de la revuo esperanto**. Tiucele ni aranĝis

specialan ekspozicion dediĉitan al la revuo mem kaj ĝiaj redaktoroj. S-ano Marĉek, bone klarigis al ni, kiamaniere li laboras en sia hejmo, kie li redaktas, produktas kaj ekspedas la revuon.

Dua prelego okazis fare de s-ano Antonio Marco Botella, sub la temo **idealismo kaj realo de la verko don kiĥoto de la manĉo**..

Luis Serrano Pérez ankaŭ prelegis pri la sama temo sub la titolo **alitipa legado de don kiĥoto**..

De la akvo al la tero, estis prelego de nia s-ano Pere Navarro-Rosines profesoro pri Botaniko en la Universitato de Barcelono. Li helpata per lumbildoj sciigis nin kiamaniere formiĝis nia planedo antaŭ miloj, milionoj da jaroj, kaj kiel la vivo venis de la akvo al tero. Okazis debato, laŭ temo **NIA SOCIO ESTAS VIOLENTA, KIAL?**

Funkciis elementa kaj supera kursoj de Esperanto, la unua gvidata de franca s-anino Lafosse Josee kaj la supera de nia kolego Salvador Aragaj. Ĉiu ĉeestata minimue de 40 lernantoj.

.Ne forgesbla estas la nokto de la "cremat" rumo bruligita kun aliaj spicaĵoj donas tre bongustan trinkaĵojn kaj trinkita per specialaj tasetoj. Ensemblo harmoniis la nokton, kie la samideanaro junaj kaj maljunaj ege amuziĝis, kantis kaj dancis, kun la muziko nomata Havanaj kantoj, kiuj tiom plaĉas ĉi tie en Katalunio.

Dum unu tuttaga ekskurso kaj du duontagaj, ni vizitis kastelon en Hostalric, iberian vilaĝon en Ullastret, la digo-lago SAU, hodiaŭ preskaŭ senakva pro la serioza sekeco

La venontan jaron la esperanto-semajno okazos ĉe alia marborda mediteranea urbo.

Semajnfina kurso en Arrout 15-16 okt

Ĉe la Sunkompanio en Arrout, ni pasigis tre bonan semajnfino por lerni kaj plibonigi niajn sciojn kun Jeannette kaj Rikardo. Alvenis Enriko de Pau, Jean-Marc de Tuluzo kaj la plej juna, la plej bela, mia filino Klementino. Ni estis kvin lernantoj kaj laboris en bonetoso. Ni trovis kaj manĝis multe da fungoj, kantareloj, hidnoj kaj boletoj. Rapide la venontan staĝon en Arrout ! Francisko.



Bâton à palabre : la ter-varmigho

Sep homoj debatis ĵaŭde la 20-an de oktobro, pri la ter-varmiĝo. Malgraŭ ke iuj trovis la temon iom teknika, fluis la opinioj, dank'al la demandoj de Jean-René kaj al la vortprovizo pretigita de Jacques. Dankon al ili.

OKAZOS

Zamenhof-festo 10-a decembro

Okaze de Zamenhof-tago ni organizas feston en Tuluzo por ĉiuj esp.istoj de la regiono.

Dato : Sabate la 10-a de decembro de la 10-a ĝis la 19-a.

Loko : Maison de Quartier Arènes Romaines, 107 Av des Arènes Romaines. Provizora Programo :

Matene : Jara kunveno (ĝenerala asembleo) de regiona asocio Esperanto Midi-Pyrénées.

Komuna tagmanĝo surloke aŭ en apuda restoracio

Posttagmeze : distra programo.

Tuttago : Libro-servo kaj Trinkejo.

Pli datala programo estos sendita poste.

Bâton à palabre : Kial la mondo estas perforta ?

Venonta debato en Bâton à palabres okazos ĵaŭdon la 24-an de novembro, je la 20-a horo.

La temo estos : 'Kial la mondo estas perforta ?' Ĉu perforto estas fatalaĵo, ĉu eblas forigi ĝin, kiel? Alportu vian opinion kaj preparu argumentojn. Sed ni argumentu pace!

Pasigi la Novjaran feston en Esperantio ?

NOVJARA AGO-SEMAJNO EN POLLANDO

Se vi ankoraŭ ne decidis, kie senstreĉe, amuze kaj sencohave pasigi la ĉirkaŭnovjaran periodon, la inta organiza teamo de la 61-a IJK invitas vin partopreni la Ago-Semajnon de Varsovia Vento kaj PEJ, kiu okazos (mar/lun) 2005-12-27/2006-01-02 en Zakopane (PL). (Eblas alveni jam la 26-an de decembro.) La unua aliĝperiodo finigxas fine de tiu ĉi monato. Legu la detalajn informojn ĉe <http://www.aso.pej.pl/>

I.S. INTERNACIA SEMINARIO EN GERMANIO

Se vi ankoraŭ ne decidis, kie senstreĉe, amuze kaj sencohave pasigi la ĉirkaŭnovjaran periodon, Germana Esperanto-Junularo invitas vin partopreni la 49-an Internacian Seminarion, kiu okazos en Xanten (DE) (mar/mar) 2005-12-27/2006-01-03. Ĝia temo estas Religioj, kulturoj kaj vivfilozofioj en la 21a jarcento. La unua aliĝperiodo finiĝas fine de tiu ĉi monato. Legu la detalajn informojn ĉe <http://www.esperanto.de/is/eo/2005/>

NOVJARA RENKONTIĜO EN FRANKFURTO/MAIN, GERMANIO

Kvindeko da homoj el ses landoj jam aliĝis al la 4a Novjara Renkontiĝo (28a de decembro 2005 ĝis 8a de januaro 2006, Frankfurt/Main, Germanio). Estos kursoj kaj prelegoj, ekskursoj en la malnovan kaj novan urbopartojn kaj la regionon, okazos teatraj kaj muzikaj prezentoj kaj silvestra festo. Speciala temo estos 'Mezepoko', kion ni traktos en prelegoj, per ludoj kaj festo por plenkreskuloj kaj infanoj. Por Esperanto-komencantoj estos intensa kurso por subteni ilian rapidan partoprenon en la ĉarma internacia etoso de la Novjara Renkontiĝo. Pli ĉe <http://www.esperantoland.org/nr>

IF : tradicia jarfina aranĝo en Trier.

Ĝuu la internaciecon de nia aranĝo kaj konatiĝu pli detale kun la plej malnova urbo en Germanio.

Nia aranĝo estas seminario por lingve spertaj personoj, baza kono de Esperanto, kaj ĝia uzo estas gravaj. Laŭdezire okazas paroligaj kaj porkomencantaj kursoj, ekz-e por via partner(in)o. La infanoj ĝuas paralelan porinfanan programon sub gvido de kunlaborantoj. Pliaj detaloj : www.internacia-festivalo.de

Universala Kongreso

UEA-Komuniko :

FRANCOIS GRIN PRELEGOS PRI LA KONGRESA TEMO EN FLORENCO

La temo de la 91-a Universala Kongreso de Esperanto en Florenco 2006 estas "Lingvoj, kulturoj kaj edukado al daŭrigebla evoluo". Pri la temo decidis la Estraro de UEA, kiu invitis kiel reĝisoron de ĝia traktado en la UK la ĉilian komitatano de UEA Jose Antonio Vergara. La traktadon de la temo partoprenos la eminenta lingvopolitika fakulo François Grin, profesoro pri ekonomiko en la Universitato de Ĝenevo, kiu festparolos en la kongresa inaŭguro. La temreĝisoro s-ro Vergara, <jovergaola@surnet.cl>, volonte akceptas proponojn pri aliaj kontribuoj kaj ideojn pri la temtraktado.

Ĉiuj estas petataj kunlabori kaj kundiskuti pri la temo jam antaŭ la UK. Por komenca

informiĝo UEA rekomendas "Raporton pri Homara Evoluo" de la Evolupprogramo de Unuiĝintaj Nacioj, kiu estas trovebla en pluraj lingvoj ĉe:

<http://hdr.undp.org/reports/global/2004/>

Oni komencis ankaŭ esperantigi la raporton. Parto de la traduko jam estas legebla ĉe:

www.tejo.org/uea/traduko_el_HDR_2004

Komento de Krokodil'Redakcio :

Kial ne debati pri tiu temo en la Bâton à Palabre ?

Mesaĝo de la Prezidanto de UEA : *Pri la Zamenhof-festo*

Ĉiutage mi legas pri antaŭanoncoj rilate al eventoj okazontaj kunlige kun la 15-a de venonta decembro, la tradicia Zamenhof-Tago kaj Tago de la Esperanto-Libro.

Vi aŭdis, ke dum la pasintaj jaroj pluraj esperantistoj havis la ideon vastigi la signifon de la tago al "Tago de Esperanto" kaj doni al ĝi ankaŭ informan elementon per aranĝado de eventoj kune kun aŭ por neesperantistoj.

Surbaze de ĉiuj ricevitaj ideoj, la estraro de UEA eksperimente ĉi-jare deklaras, ke la semajno de la 10-a ĝis la 18-a de decembro estu "Semajno de Homaj Rajtoj kaj Esperanto". Tiu semajno inkluzivas la 10-an de decembro kaj la 15-an. Artikolo pri tio aperos en la venonta numero de la revuo Esperanto.

Nun la festo ebligas kaj agadon al la ekstero (pri Esperanto kaj lingvaj homaj rajtoj, pri la idealaj valoroj de nia lingvo) kaj la tradician pli internan agadon (festo de la libro en Esperanto, kluba kunveno por memori Zamenhof). Cetere, la ekzisto de alekstera elemento (la homaj rajtoj) igas ebla kaj dezirinda la kunorganizado de eventoj kun neesperantistaj asocioj.

Do, la limo je tio, kion oni povas fari, kuŝas nur en via fantazio kaj en la lokaj eblecoj.

Mi deziras al ĉiu klubo tra la mondo sukcesan planadon kaj realigadon de la Semajno de Homaj Rajtoj kaj Esperanto.

Amike,

Renato Corsetti

Kulturo ni legu librojn



La bibliotekisto konsilas :

Jen klasikaj libroj originale verkitaj en esperanto. La unuan *La dormanta grafino* vi povas aĉeti en nia librejo ; la du romanojn *Viktimoj* kaj *Sur sanga Tero* vi povas prunti de nia biblioteko. (listo de prunteblaj libroj ĉe :

Recenzo de Miguel Fernández : Ĉu Esperanta Dostojevskij?

Fonto: Esperanto, 1993

Reta ligilo al la originalo: <http://esperanto.net/literaturo/uea/sirjaevrec.html>

Aldonita de A. G. (2004-10-19)

La dormanta grafino. Ivan G. Ŝirjaev. Vieno: Pro Esperanto, 1993. 157p. 24cm.

La nova vivo. Ivan G. Ŝirjaev. Vieno: Pro Esperanto, 1993. 78p. 24cm..

Originalaj rakontkolekto kaj romano, respektive. Pri la aŭtoro, la ruso Ivan G. Ŝirjaev (1877-1933), scioj pokas. La editoro, H. Mayer, prefate faras biografiajn peniktitojn: Ŝirjaev lernis Esperanton en 1895, instruistis, pastris ekde 1904, iniciatis la Enciklopedion kaj ellaboris gemojn – dise-mise aperintajn – de nia novel-arto.

Mayer plendas kontraŭ la ĝenerala forgeso pri la rusa E-pioniro. Prave. Projekto eldoni ties kompletan verkaron. Aplaŭdinde. Kaj kolumbe elfervoras: "En niaj vicoj estis Esperanta Dostojevskij. Sed ni ne sciis tion." Supertakse.

La Ŝirjaevaj personoj en la novelaro havas ja korpon kaj animon, konstituas psikologie interesajn tipojn, sed ne universalvalorajn arketipojn. Por memrealiĝi kiel tiaj, mankas al ili la spaco de romano kaj troas ĉirkaŭ ili sentimentalismo. Tamen, lokite sur romana dimensio, ili transiĝas al simplaj marionetoj metitaj je la servo de intrigo pasintjarcenteska kaj mielo-drama, kvankam ĉiam atento-kapta.

Ŝirjaev dominas la regionon mezan inter longa novelo kaj kurta romano. Kaj ĝuste tie li pleje trafas. Pejzaĝas arkadiojn kaj mornejojn. Beltakte fantazias kaj realumas. Teneras kaj ironias. Kaj uzas skurĝon subtile sed senkompate. Kontraŭ perfido kaj ciniko – multkaratas la epistolstila *Stranga knabinaĉo*, miaopinie, la plej altkvalita rakonto en la kolekto. Kontraŭ kruelo kaj malkaritato – *Venĝo* – sine de la klerikaro! Altfluge.

En *La nova vivo*, male, Ŝirjaev perdas la takton situacion, rolulan kaj rakontan, kvankam ne sian priskriban scipovon nek sian kapablon tenadi la intereson de la leganto. Nenie en ĝi percepteblas la pretendita reflekto de la Rusujo antaŭrevolucia. La roluloj askete bonas aŭ pliboniĝas. Neniam ili konscias pri – des malpli ribelas kontraŭ – sia sociale maljusta situacio. Eĉ pli, la *feliĉan finon* ebligas ĝuste anĝele bonkoraj riĉuloj. Tian finon aŭ pluvon roz-petalan – laŭan al felietona elnodiĝo – antaŭas fabeleska peripetio (verŝajne konceptita kiel provo savi la romanon) tute ne kongrua kun la supozita realismo de la verko.

Pleja surprizo ĉe Ŝirjaev: lia stilo. Lia lingvaĵo lirla kaj sentubera kaj natura – artisma –, diferenca disde la koda skemeco ĉe liaj samtempuloj. Lia talento por beletri per la magra vortprovizo de la fru-epoka Esperanto.

Pro ĉiuj bonoj ĝis nun komentitaj – ne pro lia eventuala dostojevskijeco – la verkaro de Ŝirjaev meritas diskonigon. Bonvenos la apero de pliaj liaj elplumaĵoj. Dume mi atendas kaj esperas kaj tiel plu.

Viktimoj kaj Sur sanga tero (originalaj romanoj): Julio Baghy, eld. Fenikso, 1991, respektive, 212 k 254 p., 14 x 21 cm, serio Esperantaj Klasikaĵoj.

Recenzas Jorge Camacho (Hispanujo). 1991 Revuo Esperanto

La esperanta roman-arto, kun malpli da idoj ol nia poezio, tamen atingis per kelkaj verkoj nivelon de adolteco. Asertas Benczik en unu el siaj postparoloj, ke nia originala literaturo povas fieri pri *Viktimoj kaj Sur sanga tero*. Prave. Kaj hontinde estas, ke kelkaj t.n. verkistoj kaj eldonistoj ne legis ilin antaŭ ol surmerkatigi siajn insulojn de revoj, kromosomojn, nigrajn magiojn, drivantajn animojn kaj toskanajn septembrojn.

Kultura analfabeto - jen kiel eblas nomi esperantiston, kiu ne legis ilin. Ekzemple min antaŭ aprilo de 1990. *Sur sanga tero* estas daŭrigo de *Viktimoj*, daŭrigo pli sukcesa kaj evoluinta el rakonta, roman-teknika vidpunkto. Kvankam oni povas legi ĉiun romanon aparte kaj sendepende, estas preferinde legi ambaŭ kiel unuan kaj duan partojn de unu sola verko: la efiko de ĉiu el la du romanoj obligas tiun de la alia. Ili temas pri la vivo de hungaraj, rusaj kaj alilandaj kaptitoj en Siberio dum la milito inter ruĝaj kaj blankaj esuanoj [anoj de la tiam Estonta Soveta Unio]. Grandparte temas pri romanigita membiografio; tamen ne eblas ekvacii, ke Julio Baghy egalas la rolulon Johano Bardy; mi pli emas pensi, ke Baghy dudiĝas aŭ tridiĝas sin en romanajn voĉojn, sed, ĉar pri la vivo kaj karaktero de la homo Baghy mi scias preskaŭ neniom, ekzemple pri liaj rilatoj kun virinoj, mi preferas ne diri mian opinion certa.

Krom la valoro de ambaŭ verkoj en nia originala literaturo, tre gravas ankaŭ ilia mesaĝo al la hodiaŭaj legantoj. La baraktoj de esu-anoj carismaj kaj bolŝevismaj, kaj de fremdaj kaptitoj inter ili, ne estas sensignifaj por la nunaj esu-anoj [anoj de Eks-Sovet-Unio]. Indas legi atente tiujn paĝojn por kompreni pli bone la iamajn kaj la aktualajn eventojn. Kaj eble do el inter la nia-epokaj esuanoj nova verkisto prezentos nove la temojn, kiujn Baghy priverkis siatempe, proponante do daŭrigon de kaj respondon al la verkaro de nia idealisma hungaro.

Jorge CAMACHO

ni ekzameniĝu

Internaciaj Ekzamenoj de ILEI/UEA en Germanio

La Internacia Ekzamena Komisiono de ILEI/UEA kaj Sarlanda Esperanto-Ligo preparas sesion enkadre de la 59-a Kultura Semajnfino, okazonta de la 16-a ĝis la 18-a de decembro 2005 en Homburg (Sarlando, Germanio).

Detaloj pri la ekzamenoj ĝenerale troveblas cxe <http://www.edukado.net> .
Pri la sesio en Homburg kaj nia arangxo Vi trovas pliajn informojn cxe <http://www.esperanto-info.net>
fonto: "Ret-Info" <http://www.eventoj.hu>

Esperanto-Kultur-Centro

1 place des Avions, 31400 Toulouse

Convocation

Assemblée générale du Centre Culturel Espéranto

Vendredi 25 novembre 2005 à 20h.

Lieu : CIDES/Artisans du Monde, 1 rue Joutx Aigues, Toulouse (quartier Carmes)

Ordre du jour :

- Election d'un président de séance et un secrétaire.
- Présentation du rapport moral et d'activité. Discussion et vote
- Présentation du rapport financier par le trésorier. Discussion et vote.
- Ratification de la décision du CA changeant le siège social au 1 place des avions.
- Renouvellement des membres du conseil d'administration : trois postes, au moins, sont à pourvoir. (candidatures bienvenues).
- Discussion des orientations générales
- Présentation d'un budget prévisionnel, montant de la cotisation.
- Questions diverses :
 - l'organisation de la Fête de Zamenhof le 10 décembre.
 - ????

*

Nous vous attendons nombreux, dans ce local du CIDES, qui accueille nos cours express depuis presque un ans.

Ceux qui n'ont pas encore renouvelé leurs adhésion pour l'année 2005/2006 pourront le faire sur place.

Candidatures : sur les six administrateurs, trois élus il y a deux ans, arrivent en fin de mandat (D. Maynau, V. Fourcassié, Chr. Vidotto). Naturellement, ils peuvent se représenter. Le nombre maximum d'administrateurs étant libre, des candidatures nombreuses sont souhaitables, afin de se répartir mieux les tâches.